

La jarkunvenon malfermis kaj prezidis la estrarano de ISAE inĝ. R. Haferkorn. La ĝenerala sekretario proponis la jenan tagordon:

1. Malfermo de la jarkunveno.
2. Raporto de la Estraro por la jaro 1957.
3. La ekonomia raporto 1957.
4. La raporto pri la fondaĵo „Scienco”.
5. Diskuto pri la raportoj.
6. Absolvo de la Estraro 1957.
7. Diskuto pri la oficiala organo de ISAE.
8. Sugestoj por la estonta laboro (precipe de la filioj kaj de la centroj).
9. Fermo de la kunveno.

2—6. La ĝenerala sekretario tra legis la jarraporton kaj la ekonomian raporton kaj informis ke la tuta, ankoraŭ malgranda, havaĵo de la fondaĵo „Scienco” estas pruntedonita por „*Sciencaj Studoj*”, ĝis ilia disvendo.

Post nelonga diskuto la raportoj estas aprobatataj kaj la Estraro absolvata por la laboro en la jaro 1957, kun dankesprimo por tiu laboro.

7. Haferkorn klarigas ke la nereguleco de la aperado de *Scienca Revuo* devigas nin starigi tre serioze la demandon pri la oficiala organo de ISAE. Ciliga informas ke li kaj aliaj ne povis aboni la revuon pere de la centro en Francujo kaj ke ĝi venadas tre sporade. Li proponas ŝanĝi la eldoniston, kiu estas superŝutita per aliaj laboroj. Sirk volas ne serĉi alian eldoniston (riska afero), sed esplori la kaŭzojn. Roelofs parolas pri multaj malbonaj manuskriptoj, lingve eĉ fuŝaj. Krome li klarigas ke la malfruo okazis precipe pro kelkaj ŝanĝoj de la redaktoroj dum la demisio de s-ro Makkink pro malsano. Lastatempe ankaŭ la kompostisto estis malsana. Li klopodos reguligi la aperigadon ĝis komenco de la nova jaro, sed li ne povas kompromisi pri la lingva nivelo kaj li bezonas helpon, almenaŭ por la indekso. S-ino v. d. Boogaard informas ke la malfruan ne kulpas la eldonisto. Haferkorn estas por la „*Bulteno*” kiel la konstanta ligilo inter la membroj.

En la diskuto oni esprimis la deziron ke unu sola homo respondecu pri la redaktado, ke oni trovu helpon por la indekso, ke oni gardu la lingvonivelon kaj resendadu al la aŭtoroj lingve tre malbonajn manuskriptojn kaj ĉiam havu antaŭ la okuloj ke la revuo devas esti la regula kontaktilo inter la membroj kaj la Estraro.

La decido: Per la kongresa materialo kaj per la prelegoj de ISU rapide eldoni la n-ojn 2, 3, 4 por ĉi tiu jaro kaj jam venontjare regule aperigadi la revuon.

8. La ĝenerala sekretario informas ke la kontakto inter la filioj kaj la Estraro estas ankoraŭ nekontentiga kaj ke ĝi devas esti pli

regula, eĉ kiam la landaj filioj nemulte funkcias en sia interna vivo. *Terminologia Centro* funkcias, sed la *Traduka Servo* kaj *CIKI* (*Centro por Internaciaj Kulturaj Interŝanĝoj*) ankoraŭ ne. Oni eble povas unuigi la lastajn du en la sama persono de Hanuŝ, kiu jam akceptis transpreni la gvidadon de la *Traduka Servo*. Smith opinias ke la *Traduka Servo* devas esti organizata pli bone kaj pli rapide.

Post la diskuto oni decidis starigi la traduktarifon, ebligante la tradukojn en Esperanton kaj pere de Esperanto kaj pri la agadmaniero de la *Traduka Servo* informi per la artikolo en la plej gravaj revuoj.

La prezidanto fermis la kunvenon je 15h.55m.

Protokolis
la ĝen sekretario
prof. B. Popović

061.22 (ISAE) : 655.4

POPULARSCIENCA BIBLIOTEKO DE ISAE

(Enkondukaj vortoj por la diskuto en la larĝa kunveno de ISAE dum la 43-a Universala Kongreso, Mainz, 1958)

Jam multe estas sur scienca kampo aperigita ĝis nun en esperanto. Oni povas dividi tiujn presaĵojn en 3 grupojn: 1. originalajn sciencajn esplorojn el diversaj branĉoj en diversaj altsciencaj revuoj aperigitaj komplete aŭ resume en esperanto; 2. la revuojn aperigitajn parte aŭ tute en esperanto, kaj 3. popularsciencajn aŭ fakajn librojn.

Oni ne disponas pri bibliografioj de ĉio aperigita en ĉiuj tri grupoj. Tiun taskon starigis la pasintjara kongreso (en sia dua kongresa sekcio) antaŭ landaj grupoj de scienculoj-esperantistoj. Sed kiam oni provas almenaŭ parte sumigi la faritan, oni nur tiam bone vidas ke ni ĝis nun atingis multe pli ol ni mem opinias.

I

Prenu la unuan grupon. Oni disponas nur pri, kiel ŝajnas, kompleta bibliografio de sciencaj kaj medicinaj verkaĵoj aperigitaj en Japanujo aŭ de japanoj. La bibliografio mencias preskaŭ 400 artikolojn aperigitajn plene en esperanto kaj multe pli ol mil parte aŭ resume en esperanto. En la tuta mondo certe estas aperigitaj kelkoble tiom da artikoloj.

Sed la perlo de ĉiu tiu publikigado estas la unua kolekto de originalaj sciencaj artikoloj aperigita pure en esperanto kaj de esperantistoj mem. Tio estas „*Sciencaj Studoj*”, aperigitaj en ĉi tiu jaro, kompre-

neble flanke de ISAE, okaze de la 50-a datreveno de ĝia unua fondiĝo.

La sukceso de „*Sciencaj Studoj*” instigas nin pripensi pli detale nian eldonan aktivecon. Unue pri „*Sciencaj Studoj*” mem, ĉu realigi la iaman ideon ke ĝi fariĝu periodaĵo! Ni ja devas esti tre singardaj, ĉar eblas ke la sukceso de la unua libro devenas de la sindonemo de esperantistoj, kiuj aĉetadis ĝin pro propagando kaj por subteni ĝian aperigon. Ni ja konscias ke ni ankoraŭ ne havas tiel multajn esperantistojn kiuj vere tiel interesiĝas pri originalaj sciencaj artikoloj ke ili devas havigi al si tian periodaĵon almenaŭ unufoje en du jaroj.

Sed aliflanke ni devas konsideri ke tia libro estas bonega, konvinka propagandilo por neesperantistaj sciencaj rondoj. Sufiĉus elteni aperigon de nur 2—3 tiaj numeroj kaj la periodaĵo certe trovus sian lokon en multaj sciencaj bibliotekoj, kiuj eĉ havas nenion komunan kun nia lingvo. Pro tio, se montriĝos ke esperantistoj povas trovi aĉetontojn por almenaŭ 500 ekzempleroj de la periodaĵo „*Sciencaj Studoj*”, ni devas daŭrigi ĝian aperigadon, eĉ kovronte provizore la perdojn per donacoj al la fondaĵo „*Scienco*”, per pruntedonoj de la amikoj, kaj per ĉiuj aliaj financaj rimedoj. Sed al tio mi ankoraŭ revenos.

II

La dua grupo de sciencaj publikigaĵoj estas la revuoj. Kompreneble oni konstante batalas kun financaj malfacilaĵoj de la sciencaj kaj fakaj revuoj presataj nur en esperanto. Multaj aperis kaj pereis, reaparis kaj denove pereis, ktp. Sed la plej vivkapablaj restis. Ni povas noti nun vivantajn tri. *Scienca Revuo*, oficiala organo de ISAE, publikigas popularsciencajn artikolojn, diskutojn pri scienco-lingvo, recenzojn, ktp. *Medicina Revuo*, eldonata de JEMA (Japano Esperantista Medicina Asocio) publikigas precipe sciencajn kaj altfakajn artikolojn el medicino. *Geografia Revuo* estas organo de IGA (Internacia Geografia Asocio) kaj ĝi estas faka kaj populara, tre interesa ne nur por la fakuloj.

Krom ili ekzistas multaj aliaj revuoj kiuj publikigas nur parte en esperanto, kun la titolo en esperanto aŭ en aliaj lingvoj.

Ĉu tri sciencaj revuoj estas tre granda aŭ tre malgranda nombro por Esperantujo? La estonteco montros la veron, sed mia opinio estas ke ni estas tre timemaj koncerne la revuojn, precipe kiam temas pri ilia pli popularscienca enhavo. Se ni certigus financajn rimedojn por elteni 2—3 jarojn en aperigado de iu faka revuo, ne altfaka, sed popularscienca, tiam certe tia revuo havus siajn abonantojn.

Sed pri tio la opinioj diversas, kaj krome mankas la financantoj. Pro tio ni devas turni nin pli ofte al tio kio estas pli realigebla kaj pri kio ni povas atingi pli egalajn opiniojn. Temas pri la tria grupo de la publikigaĵoj en esperanto.

III

Ĝis nun ni ne havis multajn fakajn kaj popularsciencajn librojn en la internacia lingvo. Sed jam montriĝis ke ili bone disvendiĝas, kondiĉe nur ke ilia kvalito estas bona. Mi atentigas nur pri du libroj de d-ro Neergaard: la faka libro „*Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj*” kaj la popularscienca „*La vivo de la plantoj*”.

Popularsciencaj kaj fakaj libroj estas tre gravaj per disvastigo de nia lingvo, precipe por la celoj de ISAE. Oni povas ilin tre bone utiligi ankaŭ por interesa instruado de la lingvo. Ni havas multajn revuojn kaj librojn en esperanto, sed nur en la beletra literaturo oni diras ion alian *per* esperanto — en aliaj libroj kaj revuoj oni pli parolas nur *pri* esperanto. Sed la homoj en Esperantujo ankaŭ bezonas havi fakan literaturon en esperanto. Ili ankoraŭ ne estas tiel multnombraj kiel por la beletra literaturo, sed en multaj fakoj ili jam sufiĉas.

Krome ni devas konsideri ankaŭ ke multaj homoj kiuj lernis esperanton kaj ne interesiĝas pri poezio, dramo, ktp., preskaŭ ĉiam forfalas el la movado. Ili ne trovas eblon konatiĝi kun iu faka kampo pli detale *per* esperanto, almenaŭ popularscience. Kial ni ne penadu reteni tiajn homojn — la penado estus certe profitdona: ni ne nur retenus ilin, sed ni certe altirus ankaŭ aliajn.

Fine oni devas diri ke pli larĝa faka kaj popularscienca literaturo en nia lingvo utilos al ĝia lingva evoluo. Oni pli ofte pensos al sciencaj kaj teknikaj esprimoj, oni pritraktos ilin, kaj la vivo mem elektados la plej bonajn. Mi mem devas konfesi, ke mi ne estas certa ĉu multaj astronomiaj esprimoj kiujn mi uzis dum scienca verkado, postvivos min, aŭ mortos jam pli frue. Pli ofta verkado solvados tiujn problemojn pli rapide.

IV

Jen la kaŭzoj pro kiuj mi proponas ke ni ekmarŝu kun la *Popularscienca Biblioteko*. Kial ĝuste biblioteko kaj ne unuopaj libroj?

La kialo por tio estas la reklamo. La sperto de multaj eldonantoj montris ke la plej grandan sukceson havas eldonaĵoj kiujn oni povas regule kaj nemultekoste reklami en propraj revuoj aŭ libroserioj. Ni havas propran revuon kaj ni certe utiligos ĝin, kvankam ĝi ne estas sufiĉe regula. Libroserio donas pli grandan certecon. Kaj nia libroserio povas komence esti kompreneble nur popularscienca. Poste ni povos eldonadi ankaŭ pli fakajn verkojn.

Kiamaniere garantii la kvaliton de la libroj? Nature tiel kiel oni faras ĉe alia eldonado — per la antaŭa kontrolo de unu aŭ du kompetentaj fakuloj. Feliĉe ni povas ĉiam trovi tiajn en la kadro de ISAE. Krome esperanto estas tiel facila por kompreno ke iam eĉ neesperantisto povas recenzi fakan libron (ni jam faris tiel kiam oni devis recenzi la libron „*La vivo de la plantoj*” antaŭ ĝia traduko nacilingven).

Kiamaniere instigi la scienculojn verki bonkvalitajn popularsciencajn librojn? Ni ja ne estas sufiĉe riĉaj por povi pagi ankaŭ la aŭtoran honorarion. Sed kiam la libro valoras, ni devas pagi la verkadon. La solvo estus en tio, ke oni povas ligi la honorarion kun la disvendado. Se la libro disvendiĝas, ĝi valoras kaj fine de la disvendo ni havas la monon por pagi la honorarion. Do oni devas komence rekoni la honorarian rajton; sed pagi ĝin nur je la fino de la disvendo. Alia eblo estas pagi la honorarion, tute aŭ parte, per la libroj, kiujn la aŭtoro mem utiligos. Tio estas tute realaj kaj honestaj ebloj.

Tiel organizota eldonado de la *Popularscienca Biblioteko* de ISAE havus larĝan publikon en Esperantujo, ĝi ne postulus grandan kapitalon kaj ĉiu nova libro reklamus ĉiujn antaŭajn. Oni eldonadus tiam kiam oni havus bonajn manuskriptojn kaj sufiĉajn financajn rimedojn. La biblioteko postulos nenian financon riskon — ĝi eĉ povas doni ian profiton, kiun oni povas utiligi por helpi eldonadon de „*Sciencaj Studoj*” (aŭ de iuj fakaj libroj bezonataj por pli facila penetra en fakajn rondojn per esperanto mem).

V

Fine ni pritraktu ankaŭ eblon ligi la popularsciencan bibliotekon kun la fondaĵo „*Scienco*” kaj kun CIKI (Centro por Internaciaj Kulturaj Interŝanĝoj). Fakte ĉio tio faras kompletan kaj bone ellaboritan sistemon por la eldona aktivado de ISAE. La havaĵon de ISAE, ĉu devenanta de la kolektitaj kotizoj, ĉu de la donacoj al la fondaĵo „*Scienco*”, ĉu ankaŭ de eventualaj prunteprenoj, ni ne povas koncentrigi en unu banko, ĉar la interŝtataj cirkonstancoj tion malebligas. Sed la bilancoj de ISAE montras ke la havaĵo ekzistas kaj ke ĝi konstante kreskas. Ĝi troviĝas ĉe diversaj delegitoj de ISAE kaj CIKI devas helpi ke oni faru partajn transpagojn de unu al alia lando. Tio kompreneble dependas nur de tio ĉu esperantistoj el la landoj kun pli libera monŝanĝo mendas librojn kaj aliajn esperantaĵojn el la landoj kun nelibera monŝanĝo sufiĉe ofte pere de la nomita Centro.¹⁾ Por nun tio komencas funkcii tre modeste, sed ni rajtas esperi ke esperantistoj trovos tiajn mendojn utilaj por ili (kaj por ISAE).

Kompreneble ni ne esperas ke CIKI ebligos fari komplete ĉiujn transpagojn, el ĉiuj landoj kun nelibera monŝanĝo. En iuj landoj la havaĵo kreskos kaj ni povos en konvena momento utiligi ĝin simple por presigo en tiu lando de unu el la libroj de *Popularscienca Biblioteko*. Tiel ni garantios al la membroj de ISAE en ĉiuj landoj ricevadi niajn eldonaĵojn kaj pagi ilin en sia propra lando. La faktajn transpagojn oni faros nur escepte kaj nur tie kie tion oni facile permesas.

¹⁾ Ne nur de tio. Ankaŭ mendoj far ne-esperantistoj de ne-esperantaĵoj povas servi al la celo, se tiaj mendoj estas plenumataj (Red.).

Do ankaŭ por ĝenerala organizo de la financoj de ISAE *Popularscienca Biblioteko* povas esti nur utila.

Prof. B. Popoviĉ

ĝenerala sekretario de ISAE

378.18 : 061.22 = 089.2(100) (STELO)

STELO

Esperanto fine venkos nur tiam, kiam ĝi akceptiĝos en ĉiuj lernejoj. Por gajni la lernejojn, ni devas gajni la universitatojn, kiuj tiel forte influas la instruistaron. Gajni la universitatojn ni povos nur tiam, kiam ekzistos forta kaj vastampleksa studenta organizo.

Ni do ĝojas anonci, ke dum la 43-a U.K. en Mainz fondiĝis la Studenta Tutmonda Esperantista Ligo (STELO), kiel studenta sekcio de la Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE).

CELO:

La Ligo celas disvastigi la Internacian Lingvon inter studentoj, antaŭenigi ĝian praktikan aplikadon en internaciaj studentaj rilatoj, kaj akceli la internacian kunlaboron de studentoj-esperantistoj. Por tiuj celoj la Ligo intencas aranĝi internaciajn renkontiĝojn de studentoj-esperantistoj, funkciigi fakan informservon, subteni internacian revuon por studentoj-esperantistoj, pliampleksigi la reton de studentaj delegitoj de UEA, kaj cetere agi per celtaŭgaj rimedoj.

MEMBRECO:

Aktiva membro povas fariĝi ĉiu esperantisto, kiu studas (aŭ studis ĝis antaŭ du jaroj) en universitato aŭ samranga institucio.

Apoganta membro povas fariĝi ĉiu alia fizika aŭ jura persono, kiu per siaj kontribuoj deziras helpi al la Ligo.

Lokaj, landaj aŭ internaciaj organizaĵoj povas **kolektive** aligi al la Ligo tiujn siajn membrojn, kiuj plenumas la kondiĉojn supre menciitajn. Se tia organizaĵo devigas sin komuniki al siaj membroj ĉiujn oficialajn informojn de la Ligo kaj de ISAE, ĝi estas devigata aboni nur unu ekzempleron de la organo de la Ligo.

KOTIZOJ:

La **individua** membrokotizo inkluzivas abonon al la oficiala organo de STELO, „*La Esperantista Studento*.” La kotizo estas 13 steloj aŭ egalvaloro. Tiuj, kiuj jam pagis la abonkotizon al „*La Esperantista Studento*,” povas fariĝi membroj de STELO je pago de 4 steloj. Tiuj,